SEMPRE BOM SABER ! ĈIAM BONE SCII ! 2015-5

ĈIAM BONE SCII - simpla publikigado por informi membrojn kaj simpatiantojn de GEA - RS, kiuj kutime ne uzas Fejsbukon por rigardi pri nuntempa Esperanta-vivo, speciale novaĵojn poŝtita ĉe GEA-Fejsbukpaĝo. FAOG12@GMAIL.COM



VERDA PICO – VERDA PIZZA – JULIO - ***renkontiĝo de esperantistoj de la urbo Porto Alegre – Brazilo***




GEA: Gaŭĉa Esperanto-Asocio
Estis tre agrabla la renkonto "Verda Pico" en tiu dua sabato de julio 2015, kaj la picoj estis tre bongustaj!

Verda Pico estos realigita ĉiam en la dua sabato en la monato, je la 18h15, en la picejo "Mundo da Fatia" - Andradas, 749.



Google plibonigis tradukilon al Esperanto kaj de Esperanto al aliaj lingvoj .





Monda Lingvo



Guillaume Armide publikigis en la grupo de Fejsbuko – Esperanto (Lingvo Internacia)



[Ensino à distância - ESPERANTO](#)

ESPERANTO BRASIL

Início Conheça » Aprenda » Comunidade » Cultura » Sobre nós »

busca

Ensino à distância – Esperanto



MONDALINGVO - interessantes informações sobre o Esperanto





Encontro esperantista no centro-oeste brasileiro

4ª ERCOR ĴUS OKAZIS!

9 DE JULHO DE 2015 ADONIS SALIBA



La 4a. Esperanta Renkontiĝo de Centro-Okcidenta Regiono de Brazilo (ERCOR) okazis inter la 3a kaj 5a de Julio, kun granda sukceso en la lasta semajnfino en la urbo Kampogrando en Sudmatogroso, Brazilo. Ĝi estis ĉefe organizita de la skipo de Kampogrando, estrita de niaj entuziasmaj samideanoj Godoi kaj Maria Garcia. Maria Garcia ĵus aperis en video-notico de Ĵurnalo OLiberdade, kie ŝi tre didaktike diskonigas la belajn motivojn por lerni Esperanton.

Multaj prelegoj kaj muzikoj estis prezentataj dum la evento. Niaj esperantistoj de tiu regiono sin preparas por akcepti la okazontan Brazilan Esperanto-Kongreson, en Januaro de 2017 en la urbo Sorriso (Matogroso, Brazilo).

Kunsido celebre al la 128-a datreveno de la publikiĝo de la Unua Libro - El Popola Ĉinio




Posttagmeze de la 4-a de julio, en la urbo Shenyang, nordorienta Ĉinio, okazis kunsido celebre al la 128-a datreveno de la publikiĝo de la Unua Libro. Pli ol 30 gesamideanoj el la urboj Shenyang, Fushun, Tieling kaj aliaj partoprenis en la kunsido. Liu Weijie, vicĝenerala sekretario de la Liaoning-a Esperanto-Asocio kaj membro de la Universala Esperanto-Asocio, retrorigardis la publikiĝon de la Unua Libro kaj la disvolviĝon de Esperanto dum pli ol cent jaroj. Li ankaŭ parolis pri la 100-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Lillo kaj ĝiaj programeroj. Post lia prelego okazis kvizo pri Esperantaj scioj.



Novaĵservo RET-INFO / Lingvo-Studio

ŜTATA DISTINGO PRO PROMOCIADO DE ESPERANTO



Edward Kozyra, konata Esperanto-aktivulo kaj propagandisto de la internacia lingvo, vicprezidanto de la Pollanda asocio "Eŭropo-Demokratio-Esperanto", ricevis la Bronzan Krucon de Merito pro la promociado de Esperanto.

La premiado okazis en la Ŝekspira Teatro en Gdansko kadre de la konferenco "25 jaroj de memregado. Defioj por la venontaj 25 jaroj". Komisiite de la Pollanda prezidento Bronisław Komorowski, la Pomeria vojevodo Ryszard Stachurski enmanigis la Oran Krucon de Merito al Gabriela Lisius pro la libervola sangodonado; la Arĝentan Krucon de Merito ricevis Jerzy Kapejewski pro popularigado de la pollandaj historio kaj kulturo. Inter la tri laŭreatoj de la Bronza Krucon de Merito estas Edward Kozyra, ricevinta la ŝtatan distingon pro la promociado de Esperanto.

La ceremonion ĉeestis, interalie, Bogdan Borusewicz, prezidanto de la Pollanda Senato, Pomeriaj senatanoj, lokaj aŭtoritatoj. En la festa ceremonio Edward Kozyra transdonis al kelkaj el la altrangaj ĉeestantoj sian freŝe eldonitan preskaŭ dumilpaĝan kvinvoluman Esperantan-anglan-polan vortaron.

Sincerajn gratulojn al Edward Kozyra!